# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 51, Numero 4-5, Aprilo-Majo 2018*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio Redaktoro: Dmitry Lushnikov, Provleganto: Nicole Else**


## Esperanto parolata en la Centra Marbordo

*Jonathan Cooper*

Ĉu vi loĝas en la Centra Marbordo aŭ Novkastelo? Eble vi loĝas en Sidnejo, sed ŝatus viziti la Centran Marbordon kaj paroli kun aliaj esperantistoj. Kial ne veni al Wyong la trian dimanĉon de iu monato kaj kuniĝi kun ni? Nia kunvenejo estas ĉarma kafejo apud la stacidomo (kun fervoja temo).

Dum nia maja kunveno ni dividis vortojn, kiujn ni antaŭe ne konis aŭ de kiuj ni ne certis pri la signifo. Ekzemple, ni diskutis la apartajn sed rilatajn vortojn "plato", "plado", "pleto" kaj "telero". Ni ankaŭ provis traduki kelkajn anglajn idiomojn, el longa listo, en Esperanton, por ke ne-angla-parolantoj komprenu ilin. Unu membro, kies gepatra lingvo ne estas la angla, tre interesiĝis pri tio, ĉar ŝi komprenis malpli ol duonon el la listo. Ekzemple, "It was a perfect storm," kiu signifas, ke multaj fuŝaĵoj kune kaŭzis la plej malbonan situacion.

Ni havas membrojn de ĉiu nivelo de flueco, do ĉiuj estas bonvenaj.

La Esperanto-Klubo de la Centra Marbordo kaj la Esperanto-Societo de Newcastle kunvenas ĉe Albert's Cafe, 3 Railway Square, Wyong (goo.gl/maps/aQx88nSH6c32), la trian dimanĉon de ĉiu monato, 11:45–13:45. Kontaktu: Joanne Cho, tel: 0413 087 340, aŭ vidu detalojn ĉe la retejo Meetup: www.meetup.com/Esperanto-in-Sydney.



Membroj kaj vizitantoj dum antaŭ nelonge okazinta kunveno: Steven Garamy, Joanne Cho, Jonathan Cooper, Andrew Spannenberg, Dmitry Lushnikov kaj Eckard Roehrich.

## Prepari por la Jarkunveno

Jonathan Cooper, prezidanto




Estas ankoraŭ frue, tamen estus bona ideo nun pensi pri la Jarkunveno de la Esperanto Federacio de Nova Sud Kimrio, kiu okazos dimanĉon, la 7an de oktobro 2018. Kial? Ĉar la Federacio bezonas vin! Bonvolu konsideri nomumi vin por voĉdono kiel estrarano. Esti parto de la estraro estas grava respondeco, sed ankaŭ ĝuo. Ne maltrankviliĝu, se vi sentas, ke via nivelo de Esperanto ne estas tiom alta kiom vi ŝatus: la kunvenoj kaj protokoloj estas en la angla (pro leĝo). Vi eĉ ne devus ĉiam fizike ĉeesti: iuj estraranoj uzas Zoom (simila al Skype), por partopreni de for.
La Majstro mem feliĉus bonvenigi vin kiel novan estraranon!

## Maitland RiverLights Festo

Andrew Spannenberg

Ĉu vi provis prezenti lingvon? Kial ni bezonas lerni ĝin?

Je multkultura kunteksto, Esperanto estas prudenta kiel komuna dua lingvo. Tio nur estas se ni estas en anglaparolanta lando, kaj ni ŝatas nian denaskan lingvon. Se konscii ke plejparte la mondo ne parolas la anglan sufiĉe flue por konversacii kun ni, ni havas solvon. Renkonti ĉiujn je la duono de vojo.

Dum bela sabato la 10-an de februaro 2018 kelkaj Esperantistoj kunvenis por alpreni la malkredantojn, ĉe Maitland RiverLights Festo. Ni estis diversaj Esperantoparolantoj - de Rusio, Germanio, Ĉinio, Novkastelo kaj la Centra Marbordo. Niaj tabloj kaj seĝoj estis private prunteprenitaj, de "Cultures In Action" de HunterLETS - loka interŝanga sistemo, komunumo valuto. La loka restado de nia germana gasto ankaŭ estis pagita tra la sistemo. CIA preparis la Cultural Stomp, multkultura festo en Newcastle.

Kaj la interkonsentiĝo? Ni faros ĝin denove iam. Kaj faros nian informan tablon pli proksime kun aliaj kulturaj grupoj. Ni havos pli da montriloj kaj flagoj.

La sekva Maitland RiverLights Festo okazos sabaton la 13-an de oktobro 2018.



## Pica vespero ĉe Esperanto Domo

Ni havis specialan gaston el Francio: Godeleine Logez. Ŝi tradukis la romanon de Anna Lowenstein "La ŝtona urbo" el Esperanto en la francan lingvon. Ŝi ankaŭ tradukis en Esperanton francan novelon kaj ŝi klarigis al ni kial ŝi tre ŝatas tiun novelon kaj laŭtlegis la komencon de ĝi.

La sekva pica vespero okazos sabaton la 16-an de junio je la 6a ptm ĉe Esperanto Domo.

## Membrokotizoj

Dankon al ĉiuj kiuj estis membroj en 2017. Nova jaro komenciĝis. Bonvolu ne prokrasti kaj remembriĝu. Se vi ankoraŭ forgesis, ne estas tro malfrue:
Iru al esperantohouse.org.au/about-us/join
Ni akceptas pagon per kreditkarto, PayPal aŭ ĝiro.

EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 15:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde 17:00 la Capital Pancakes, 122 Alinga St.,Civic. Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo: Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 15:00 – 17:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*





| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Andrew Spannenberg |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Dmitry Lushnikov |
| Estrarano: | Alan Turvey |

# amikumu

Amikumu estas apo (poŝtelefona aplikaĵo), kiu helpos vin trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn – ĉiam, ĉie!

Elŝutu Amikumu
iPhone 4S aŭ iPad 2+:
Android (OS 4.0.3+):




Esploru profilojn kaj esprimu vin

Trovu esperantistojn apud vi ĉiam, ĉie

Konatiĝu kaj renkontiĝu!

La utileco de tia aplikaĵo por esperantistoj estas klara, iusence ĝi estas ĝisdatigo de la plej malnova servo de UEA, la Delegita Reto, kiu same celis plifaciligi kontaktojn inter homoj dum vojaĝoj aŭ pri komunaj interesoj.
– Mark Fettes, la Prezidanto de UEA

En Londono, mi trovis esperantiston apude per Amikumu kaj ni renkontiĝis tutsimple tiel.
Mi apenaŭ povas atendi por uzi ĝin denove!
– Orlando Raola, Prezidanto de Esperanto-USA



## Por disvastigi Amikumu

Plusendu ĉi tiun flugfolion al ĉiuj konatoj per retpoŝto, fejsbuko kaj tvitero.
Plusendu ĉi tiun flugfolion al la organoj de via loka movado.
Printu ĉi tiun flugfolion kaj diskonigu ĝin ĉe via loka klubo.

Se vi volas kontakti la teamon de Amikumu pri gazetaj anoncoj aŭ demandoj, bonvolu retpoŝti nin ĉe

- info@amikumu.com
- amikumu.com
- www.facebook.com/amikumuapp

La Oficiala Sponsoro de Amikumu estas la Universala Esperanto-Asocio